

Ĉu Japanio plaĉas al eksterlandanoj?

Inter la "orientaj" landoj, Japanio estas certe unu el la plej ekzotikaj por la alilandanoj. Ĝi estas kulture unika kaj ĝi konservas fascinajn tradiciojn kaj valorajn kulturaĵojn. Japanoj ŝatus demandi al eksterlandanojn, ĉu Japanio plaĉas al ili. Al tiu demando la gastoj certe dankeme kaj afable jesas. Sed ĉu vere?

Kiel eksterlandano, mi ofte rimarkas, ke unu el la plej oftaj temoj inter eksterlandaj loĝantoj (ne turistoj) en Japanio estas plendado pri diversaj aspektoj de la japana societo. Japanio ŝajnas por multaj eksterlandanoj esti paradizo por turismo, sed tre malfacila loko por loĝado kaj vivado. Antaŭ ne longe mi eĉ legis tezojn kaj librojn pri tiu ĉi temo. Tamen pri kio oni plendas en tiu ĉi bela lando?

La problemo ŝajnas al mi ĉefe homrilata. Eksterlandanoj sentas sin ofte izolitaj en la japana socio, eĉ por tiuj, kiuj superfortis la lingvan barilon. Japanoj estas formale amikaj al eksterlandanoj sed ne intime amikiĝas kun ili. Interalie, multaj japanoj tre zorgas pri "privateco". Najbaroj apenaŭ salutas unu la aliajn; amika frapado de pordo estas farita nur de suspektindaj religianoj aŭ vendistoj. Eĉ *fejsbuk*-uzantoj japanaj malofte montras siajn vizaĝojn (malgraŭ la nomo de la retejo).

Cetere ankaŭ mi havas tiajn spertojn - mi ofte invitas hejmen miajn amikojn kaj konatulojn japanajn kaj ne japanajn. Strange miaj japanaj invititoj aŭ reinvititoj preskaŭ neniam min invitas reciproke. Kelkaj eksterlandanoj, kiuj dum jardekoj loĝas en Japanio, ankaŭ konfesis al mi, ke tiu fenomeno tre ĝenas ilin, kaj verŝajne intima amikeco simple ne eblas en Japanio. Amikeco ekzistas nur formale, ekzemple pere de membreco de sama asocieto aŭ partopreno de ia komuna agado.

Laŭ mi tamen tio ne absolute veras. Ĉar mi mem havas kelkajn (sed

ne multajn) tre bonajn japanajn amikojn, kiuj fojfoje invitas min al ties modestaj hejmoj. Miaj japanaj amikoj klarigas al mi, ke nur intimaj amikoj invitas unu la aliajn al siaj hejmoj; sed por multaj alilandoj, oni invitas konatulojn al siaj hejmoj por fariĝi intimaj amikoj. La pensmanieroj estas malsamaj. Ĉiukaze, do, vera amikeco ja ekzistas inter japanoj mem kaj ankaŭ inter japanoj kaj ne-japanoj. Sed socia normo estas tre forta en Japanio kaj japanoj ĝenerale hezitas fari erarojn, precipe en la komplika fako de interkulturaj etiketoj. La plej efika maniero eviti erarojn kaj postlasadon de malbonaj impresoj estas simple silente fari nenion. Pro tio, japanoj preferas ne iniciati kontakton kun fremdulojn aŭ nekonatojn ĝenerale. En aliaj landoj, tia socia normo ne estas tiom forta kaj oni ne hezitas *varme* amikiĝi kun eksterlandoj.

En la labora mondo, homa rilato en japana societo estas tre hierarkia kaj konformisma. Tio estas tre streĉita afero eĉ por japanoj mem kaj ofte nekomprenebla al ne-japanoj, eĉ tiuj, kiuj restas en Japanio dum jardekoj. Iu fremda studentino iam rakontis al mi tre pensigan rakonton. Al ŝi tre plaĉis ĉevaloj. Dum la trijara restado de Japanio, ŝi deziris aliĝi al la ĉevala klubo kaj ĝui ĉevalrajdadon. Sed laŭ la "reguloj" de la klubo, novuloj dum du jaroj devas ĉiutage frumatene purigi ĉevalfekaĵojn kaj post la tria jaro, atinginte la statuson de *senpai* (respektinda antaŭulo), *eble* oni ekĝuus rajdadon. La studentino sentis sin tre indigna, ĉar eĉ post du jaroj da fekaĵ-purigado, neniu povas garantii, ke ŝi povos ĝui ĉevalrajdadon! La hierarkiismo certe ne havas ajnan meriton por la alilandanino.

Grupa aŭ kolektiva pensmaniero estas ankaŭ aparte forta en Japanio kaj pro tio individualismaj fremdlandanoj ofte trovas japanojn nekomunikemaj. En konkursoj de internaciaj bursoj, japanoj ofte fartas tre malbone, ĉar la plejmulto de japanaj kandidatoj malsukcesis klare esprimi sin kiel sendependaj, kreivaj individuoj. Tamen ĉu tio estas antaŭjuĝoj de eksterlandanoj? En Japanio certe ne mankas kreiveco! Vidu la *manga* kaj ĉiajn novajn kaj interesajn produktojn.

Antaŭ nelonge, mi aliĝis al *couchsurfing* (ne-esperanta versio de Pasporta Servo, kiu interalie, ne plu tiom viglas kiel antaŭe) kaj dank' al ĝi mi renkontis tre interesajn internaciajn gastojn kaj ankaŭ aliajn japanajn gastigantojn. Iu gastigantino japana iam plendis al mi, ke francoj estas ĉiam teruraj gastoj. Mi kontraŭis, ĉar ĉiuj miaj francaj gastoj estas agrablaj kaj amindaj. Sed la vero iom post iom klariĝis - la impreso pri iu popolo aŭ iu lando vere dependas je la spertoj de la individuo. Se malfeliĉe oni renkontis plurajn malagrablajn francajn gastojn, oni verŝajne pensas, ke francoj ĝenerale estas teruraj - tio estas la malfeliĉa impreso de tiu japana gastigantino. Mia sperto estas renversa, ĉar feliĉe mi akceptis (kaj fakte tre zorgeme selektis nur) bonajn gastojn; interalie mi studas francan arton kaj muzikon dum jardekoj kaj mi parolas la francan!

Denove al nia unua demando - ĉu Japanio plaĉas al eksterlandanoj? Tio vere dependas je kiajn spertojn oni havis kaj kiajn homojn oni renkontis. Dank' al Esperanto, mi konatiĝis kun multaj afablaj, gastamaj kaj pacamaj japanoj. Fakte mi renkontis ankaŭ tre malagrablajn homojn en Japanio, kiel ĉie en aliaj partoj de la mondo, kie mi travojaĝis. Sed miaj bonaj japanaj amikoj estas tiuj, kiuj postlasis al mi tre pozitivan impreson pri Japanio, kiu interalie estas komplika multflanka moderna socio. Verdire, per nia komuna lingvo, ni fariĝas ambasadoroj de nia kulturo, kiuj disvastigas komprenemon kaj bondezirojn. En nia mondo, kie kreskas ĉie senĉese misinformado kaj ĉiaj ekstremismoj, komprenemo kaj bondeziroj estas ĉiam tre bonvenaj!

フランスで出合った究極の儉約男

群馬エスペラント会 ほりやすお

前回に続いて、フランスの話。私のフランスでの講演旅行では、宿泊は全部ホームステイである。大体年金生活者の家が多く、以前子どもたちがいた部屋をあてがわれることが多い。こうして、まあ、フランスの家庭の隅々まで覗いてしまう、というところだ。

さて、フランス訪問 3 番目の都市 Angers に着いた。駅で出迎えてくれたのは Laurent VIGNAUD という 50 歳は越えている男性。アパートは、駅から歩いて 3 分という至便なところにある。部屋は3階。あてがわれた部屋には驚いた。ベッドが一つ、小さな本棚、掃除機、後は洗濯物の物干しだけである。天井には電気もなく、彼は小さな電気スタンドを持ってきた。普通、どこの家でも、バスタオル、顔拭きタオル、それに手が入る袋状になったあかすりを渡されるのだが、そんなものはなく、タオルを貸してくれと言っても「ない」という返事。枕もない。

台所にある電気製品は、電子レンジ、冷蔵庫、洗濯機のみ。冷蔵庫の扉が少し開いていたので、中を見ると何も入っていない。扉を閉めると、「閉めるな」という。閉めるとカビが生えるからである。電気はもちろん入っていない。要するに食器棚代わりである。彼は、昼食だけしか食べない。昼食は職場で食べるらしいのだが、ビュッフェスタイルのレストランで最低のものを注文して、ただのサラダを食べ、主食はビスケットである。ビスケットは、パンのように焼かなくても良いし、カビも生えない。いつでもすぐ食べられる。私たちが前の滞在地からもらってきたパンもいらぬという。朝食には、水も飲まない。私たちには、コップに水を汲んで、それをチンして、お茶を淹れて出す。水も、使った水はトイレに使う。生ごみは、親の家に行ったときに庭の堆肥にする。

ラップトップのパソコンはあるが、プリンターはない。必要なときには近所のプリント屋に行く。机も椅子もあるが、職場でいらなくなったもの。そのほか、ほとんどすべては、どこからかもらってきたもので、自分で買ったものはないようだ。

同行の荒井さんは、別の部屋をあてがわれたが、こっちは似たような部屋で、ただし奥さんと 9 歳の娘がいるので、押入れのようなところを覗くと多少の衣類などはあった。寝る部屋はこの 2 つしかないの、「あなたはどこに寝るんだ」と聞くと、好きなときに椅子に座ったままで寝るから、心配するな、という。昔のスウェーデンでは、完全に横たわって寝るのは死人だけで、生きている人は、短いベッドに足を投げ出し座ったままで寝たのだから、その方式だという。本当にいつ寝るのか、寝たのか、寝ている姿を 3 日間一度も見なかった。

この男は、鉄道員である。近くの駅に勤めている。始発の前には駅にいななければならないし、終電のあとまでいななければならないから、車は必需品で、仕方なく持っている。地下の駐車場に入れてあるが、自分の借りているところからちょっと動かすときには、車を押して出す。われ

われがいた 3 日間、全然働きに行かない。理由は、60%勤務、という勤務形態を選択しているからだ。以前は 100%だったらしいが、エスペラントをやり出したら忙しくて、100%ではとてもエスペラントの仕事が出来ないので、60%を選択したという。彼は、給料は低いが、常勤なので、首にならないことを高く評価していて何の不满もないという。フランスでも、今ではすぐ首にするらしいので、常勤でいることは大きなメリットなのだ。

洗濯機は使っている。フランスの洗濯機は、乾燥機も付いていないのに、何と洗い終わるのに 2 時間かかる。桶の部分に衣類を入れるのは同じだが、水は見えない。洗剤はふたの下の箱のようなところに入れ、スイッチを入れると、ゴー、しばらく止まって、またゴー。これを 2 時間繰り返すのだ。ゴーのときに水が出ているらしい。こんなに長時間かかるので、夜などにやるとアパートのほかの住民の迷惑になるので、昼間に洗濯する。そして干す。どこの家もこの方式の洗濯機で、これには全くあきれてしまう。どこの国でも洗濯は水をするのだから、日本の二槽式のような発想になりそうなものだが、フランスでこれだけは全く理解できない。

こんな彼にも妻と子どもがいる。いなければもっと節約できそうなものだが、いるのである。その妻は、中国人である。2006 年のイタリアで開かれた世界大会で出会って結婚したらしい。子どもはその妻の連れ子であるが、3 人で川の字になって寝ているという。妻は、里帰りでいなかったが、どうもこの妻は、私の知人であるらしかった。2000 年ごろ、私はどこかでシャオシャオという名前の中国人女性と知り合い、しばらくメールを交換した。どうも少々神経過敏なところがあったが、文才に長けていたので、激励した。そのうち彼女はポーランドへ行き、その後イタリアの大会で再会したが、音信は途絶えたが。その彼女が、この Laurent の妻になっていたのだ、しかも 9 歳の子どもをつれて。写真を見たが、写真が小さかったのと、前より太っているらしく、はっきりとは確認が出来なかった。でも、多分彼女だろう。

彼のアパートは、全く女っ気がない。小学生の子どものいる雰囲気もない。いったいどんな気持ちで、この 50 歳は越えている Laurent は中国人の妻をもらい、またシャオシャオは、この Laurent と結婚したのだろうか。なんとも不思議である。こんな何もない生活に、妻と子どもはよく耐えられるものだ。中国から逃れて、フランス人と結婚してここに住めるというので、満足しているのだろうか。

しかし、この究極の節約男の生き方に、私はかなり同感した。我が家には、ものは有り余るほどあるが、廃品回収所に捨ててあるものを拾うのは大好きだ。食べ物の容器でも何でも、何か別のものにつかえないかとすぐ考える。着るものも、家にいるときには構わない。最近では外でも構わない。朝ごはんは食べない。現在はこの男に学んで、トイレの小のときはペットボトルの水を流すようにした。前から、出す量よりも多くの水を流すことをおかしいと感じていたので、彼の家の壊れたトイレのペットボトルが大いに気に入った。ついでながら、同行の荒井さんは、小のときにも座っていると、トイレ掃除が楽だというので、それに倣って座ってすることにした。そして、ペットボトルの水でちょっと流しておく。

2012 年 10 月 11 日